

Kia lingvo estas Esperanto laŭ tipologia vidpunkto?

1. Enkonduke

Lingvotipologio estas unu el la plej malnovaj branĉoj de la lingvoscienco. Jam komence de la 19a jarcento, samtempe kun la naskiĝo de la historia (hindeŭropa) lingvoscienco, oni ekfaris esplorojn, kiujn oni nuntempe nomas tipologio: Komparo de lingvoj laŭ ilia strukturaj trajtoj, sen atento de ilia geografia situigo aŭ (ebla) parenceco inter ili. Temas do pri esence sinkrona fako de la lingvoscienco.

Komence oni utiligis nur morfologiajn kriteriojn, la riĉeco kaj komplekseco de la lingvoj tamen poste neprigis evoluon de aliaj subfakoj, kiuj estas karakterizitaj en la sekvaj ĉapitroj, kune kun konkludoj pri la lokiĝo de Esperanto en la unuopaj klasifikaj sistemoj. La moderna lingvistiko komparas lingvojn fonologie (vd. 2.), laŭ morfologiaj procezoj (vd. 3), laŭ diversaj sintaksaj trajtoj (vd. 4.), kaj finfine laŭ la konsisto kaj organizo de la leksiko (vd. 5.).

Tamen hodiaŭ la nura klasifikado ne plu tiom gravas, sed multe pli la kombino de la unuopaj punktoj (demandante, ĉu ekzemple diversaj trajtoj aperas ĉiam kune), kio celas la eltrovadon de la t.n. universalajoj kaj pli bonan komprenon de la origino de la homa lingvo.

Oni atentu, ke tia klasifiko ĉiam estas samtempe formo de plisimpligo. Neniam oni trovas lingvon, kiu pure reprezentus difinitan lingvan tipon, oni do povas paroli nur pri certa *inklino* al tiu aŭ alia tipo.

2. Esperanta fonologio tipologie

2.1 Oni ofte parolas pri „vokalaj“ kaj „konsonantaj lingvoj“, sed malantaŭ tiuj terminoj troviĝas du sufiĉe diversaj vidpunktoj:

a) Fonologie: Konvencie oni nomas vokalaj lingvojn, en kies sonsistemo pli ol 30% de la fonemoj estas vokaloj (kp. pri ĉio Polański 1999:277s.). Laŭ tio ekstreme vokala estas la franca (15 vokalaj, 18 konsonantaj fonemoj, t.e. 45,5 : 54,5 %), ekstreme konsonanta la ĉerkesa (3 vokalaj, 67 konsonantaj fonemoj, t.e. 4,3 : 95,7 %). Esperanto kun siaj 5 vokalaj¹ kaj 23 konsonantaj (aŭ 24, se oni konsideras *dz* unufonema) fonemoj, t.e. 17,9 : 82,1 %, estas modere konsonanta lingvo (kp. la polan: 15,4 : 84,6 %)

b) Tamen eble pli valora estas la informo, kiom ofte iu sono efektive aperas en la parolo. La esploro de Dominte 2001 rezultigis, ke *a*, *o*, *i*, *e* estas la plej oftaj sonoj Esperantaj (pro ilia uzado en finaĵoj kaj kiel kategori-vortoj; *u* troviĝas en la 13a pozicio), kaj ke entute la rilato

1 Wells 1989:19 atentigas, ke tre multaj lingvoj havas ĝuste kvin-membran vokalfonemaron.

vokaloj : konsonantoj en Esperanto estas ĉ. 43 : 57 % (en lia listo de 17 lingvoj unuarangas la finna kun 51 : 49 %, lastrangas la usona angla kun 37,4 : 62,6 %; Esperanto laŭpozicie similas al la latina, slovaka kaj franca). Do fine la Internacia Lingvo ne estas tiom konsonanta, kiel ŝajnis la komparo de la fonemaro.

2.2 Interesa povas esti ankaŭ klasifikado laŭ fonotaktiko, do laŭ eblaj kombinoj de sonoj (precipe grupoj de konsonantoj), ĉar la lingvoj treege varias en ĉi tio: Dum la japana silabkomence allasas nur unu konsonanton aŭ plozivon + /j/ kaj silabfine nur *n* (ekz. *Yo-ko-ha-ma, To-kyo, Sho-gun*), en la pola eblas ne malpli ol 724 konsonant-grupoj (Dalewska-Greń 1997:153). Mankas ĝis nun monografio aŭ almenaŭ speciala pritrakto de tiu temo por Esperanto, valorajn konstatojn enhavas tamen la eseo „Silabo kaj silabado“ de Marc BAVANT (kun plia literaturo). Pro la heterogena konsisto de la Esperanta leksiko tia esploro verŝajne ne rezultigus koherajn regulojn.


2.3 Penseblas kompreneble ankoraŭ aliaj kriterioj:

a) Kelkaj lingvoj utiligas la supersegmentajn trajtojn tonalteco aŭ -konturo por esprimi diferencojn leksikajn (ekz. la ĉina) aŭ aliajn (ekz. la sveda), aŭ ili almenaŭ distingas diversajn intonaciojn (ekz. la litova). Esperanto kiel la plimulto de la lingvoj ne konas tonemojn aŭ sim.

b) Kiel la terminoj jam esprimas, en silab-ritmaj lingvoj (ekz. la latinidaj) la tempaj unuoj, kiuj difinas la ritmon de la parolo, estas la silaboj (subtipo estas mora-ritmaj lingvoj, ekz. la helena), dum en la akcent-ritmaj lingvoj (ekz. la ĝermanaj) regula apero de akcenthavaj silaboj sekvigas malfortigan elparolon de neakcentitaj silaboj (kp. la anglan, kie elparolo de vokalo varias depende de la longo de la vorto). Esperanto pro la regulo, laŭeble egale kaj klare prononci ĉiujn sonojn, verŝajne inklinas al la unua tipo, tamen granda etnolingva influo ĉe la parolantoj estas verŝajna.

3. Esperanta morfologio tipologie

La sekva arbo montras (unu eblan) klasifikon de lingvoj laŭ iliaj ĉefaj morfologiaj procezoj. Ne aperas en ĝi la konataj terminoj plursintezeco kaj enkorpigo.² Multaj lingvistoj uzas ilin homonime, aliaj (ekz. Bußmann) faras nocian distingon. Tiel aŭ alie, oni povas kompreni la unuan kiel ekstreman tipon de aglutineco, la duan simple kiel formon de kunmetado.



2 Plursinteza lingvo kombinas multajn negramatikajn (t.e. signife relative konkretajn), samtempe nememstarajn morfemojn en unu vorton, tiel ke ekestas (ofte tre longaj) vortoj, kiuj respondas al plenaj frazoj en aliaj lingvoj. Enkorpiga lingvo morfologie enmetas la objekton (nespecifan) en la predikatan formon. Oni povas kompreni kunmetaĵojn kiel *fiŝkapti*, germ. *Rad fahren* 'bicikli' formo de enkorpigo.

La ĉi-supra klasifiko bezonas iom da prikomento: *Sinteza* kaj *analiza* indikas bazajn procedojn, kiuj aperas apud si en ĉiu lingvo. La unua signifas, ke pluraj morfemoj estas ligataj al unu formo, tiel ke oni povas segmenti la rezultantan fonetikan vorton en plurajn malpli grandajn unuojn. En la dua okazo tia analizo ne estas ebla, ĉar la unuopaj morfemoj ne ligiĝas al fiksa konstruo. Kp. ekzemple la polan *poszedlem* kaj la anglan *I have gone*: La unua vorto estas analizebla laŭ morfemoj (*po-* perfektiva aspekto, *-szed-* radiko, *-l-* preterito, *-em* la persono singulara), la dua vort-grupo dividas la informojn en unuopajn vortojn, kaj la indiko pri perfekteco kaj preterito entute videblas nur el la respektiva kombino.

Izolaj lingvoj plej ofte (sed ne ĉiam, ekz. kunmetado en ili estas kutima fenomeno!) uzas analizajn konstruojn por esprimi ion, t.s., ke ankaŭ gramatikaj funkcioj estas indikataj helpe de ofte memstaraj, neŝanĝeblaj morfemoj, ne per la modifoj de vortoj. Tipa eco de izolaj lingvoj estas, ke ili havas relative fiksan vortordon, precipe por indiki aganton kaj pacienton, kp. la anglan ordon ... *subjekto (adverbo) predikato objekto* ..., kiu apenaŭ estas modifebla sen ŝanĝo de la senco. Ekzemplo por izolaj lingvoj estas la klasika ĉina literatura lingvo, la vjetnama, aŭ, el la planlingva sfero, Glosa, kp. *mi fu lekto plu libri* 'mi legos (la) librojn'.³

Ene de la *sinteza lingvoj*, kiuj do uzas morfologion por esprimi ion, oni povas distingi du principojn: La *alternaj lingvoj* amplekse modifas la radikojn, ofte sen aldono de aliaj morfemoj; kutima ekzemplo estas la semitaj lingvoj, kp. la akadan radikon *p-r-s* 'dividi': *iparras* 'li dividas' (*i-* estas prefikso de la 3a persono singulara; alomorfo *u-*), *iprus* 'li dividis', *uparris* 'li dividigis', *parāsu(m)* 'dividi' (*-u(m)* estas finaĵo de nominaloj en nominativo), *pārisu(m)* 'dividinta', *parsu(m)* 'dividita', *paris* '~esti dividi(n)to' (stativo) ktp.⁴ Alie, la afiksaj lingvoj plej ofte uzas nememstarajn morfemojn, la t.n. afiksojn, kiuj esprimas gramatikajn rilatojn (finaĵoj) aŭ estas uzataj en la vortfarado (deriviloj). Kp. por ĉio la diversajn rimedojn indiki pluralon en glosa *plu libri*, indonezia *buku buku*, araba *kutub* (sing. *kitab*), turka *kitablar*, pola *książki*, germ. *Bücher* (sing. *Buch*) 'libroj'.

Ene de la afiksaj lingvoj la t.n. *aglutinaj lingvoj* kutime kombinas unusignifajn, klare segmenteblajn morfemojn al unu vorto, kp. la turkan *evlerime* 'al miaj domoj' (*ev-ler-im-e* domo-j-mia(j)-al, Piron 1980:7). Dum la radikoj restas plejparte senŝanĝaj, tiuj nememstaraj afiksoj plej ofte iel adaptiĝas al la radikoj, ekz. per vokala harmonio, kp. *Oymaağaç Höyüğü* 'la *höyük* (~ruinejo) de (la urbo) *Oymaağaç*' kun la formo *-ü* de la morfemo *-u/-ü/-i/-ı* 'lia, ĝia' depende de la antaŭa vokalo (sed ĉi tie oni vidas ankaŭ modifeton de la radiko, nome la sonŝanĝon *k > g* antaŭ vokalo).

3 Ekzemplo el la Interreto; *mi* = mi, *fu* = (futuro), *lekto* = leg(-i), *plu* = (pluralo), *libri* = libr(o).

4 Oi nomas tion ankaŭ 'interna fleksio' kaj konsideras tiajn lingvojn formo de la fleksiaj, ĉar ambaŭ grupoj same modifas la radikojn, dum la aglutinaj lingvoj tion ne faras. La ablaŭto/apofonio en la hindeŭropaj lingvoj estas simila fenomeno, kp. germ. *trink* 'trinku', *Trank* 'trinkaĵo', *Trunk* (origine) 'trinkado'.

Fine la *fleksiaj* (aŭ *fandaj*) *lingvoj* estas morfologie plej obskuraj, ĉar en ili radiko kaj afikso(j) ofte fandiĝas al ne aŭtomate analizebla formo (ekz. lat. *regens* 'reganta' < stamo *regent-* + nominativa *-s*), kaj la afiksoj estas ofte multifunkciaj (ekz. germ. *guter* 'bona', kie *-er* esprimas samtempe nominativon, singularon kaj maskulenan genron), homonimaj (ekz. germ. *-en*: genitivo, dativo aŭ akuzativo singulara, ĉiuj kazoj en la pluralo, infinitivo, 1a aŭ 3a persono plurala, participo pasiva...) aŭ sinonimaj (ekz. *-ec-* en la germana: *-heit*, *-keit*, *-tum*, *-schaft*, *-e...*).

Nun stariĝas la demando, kian pozicion Esperanto havas en tiu kompleksa ordo. Fakte, kiel ĉiu lingvo, ĝi havas trajtojn de pluraj tipoj. La verbaj finaĵoj estas plurfunkciaj (modo, tenso, (ne)finitiveco), do fleksiaj⁵, dum la nominalaj finaĵoj *-j(-)* kaj *-n* estas nememstaraj, unufunkciaj (pluralo resp. ne-subjekto), do kiel en aglutinaj lingvoj (tamen ili estas neŝanĝeblaj). Pro tio Esperanton oni kutime klasifikas aglutina lingvo (ekz. Wells 1989:27: „kiel konate“). Tamen Piron 1980 (*passim*, precipe 18-24) atentigas prave, ke la granda plimulto de la Esperantaj morfem-tipoj estas memstara kaj absolute neŝanĝebla, kiel en izolaj lingvoj. Por li tiu trajto estas eĉ la plej baza distingo inter la lingvotipoj (fleksiaj lingvoj: ĉiuj morfemoj estas modifeblaj – aglutinaj lingvoj: nur la gramatikaj morfemoj estas modifeblaj – izolaj lingvoj: neniuj morfemoj estas modifeblaj; p. 2s.), kaj kun etaj esceptoj Esperanto en sia profunda strukturo (kp. pri la koncepto Piron 1980:18s.) funkcias laŭ ĉi-lastata modelo. Ne povas esti dubo pri la „solstarivo“ de la Esperantaj morfemoj, kvankam la verbaj finaĵoj, la kategori-vortoj kaj kelkaj vortfaradaj afiksoidoj praktike ne aperas memstare⁶. Komparu pri tio la absolute unusencan, plene citindan klarigon de Zamenhof mem:

Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro, Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj, k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), – li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo. (Zamenhof 1992:234; laŭ la antaŭparolo al la Unua Libro 1887, en la germana eldono p. 13)

5 Precipe atentinda estas la modifo de radikoj alprenantaj la sufiksojn *-ĉj-* aŭ *-nj-*, ekz. *patrino* → *panjo*. Ankaŭ la akordigo de adjektivoj al la substantivoj estas tipe fleksi-lingva trajto.

6 Tio dependas de la lingvaj kutimoj de la esperantistoj resp. de la tre ĝenerala signifo de la koncernaj elementoj, ne de iuj malpermesoj de la lingvo; kp. la kuraĝan uzon de *o*, *as* ktp. ĉe Antoni GRABOWSKI. Memstareco de la kategori-vortoj estas krome nepra por ĝusta analizo de multaj kunmetaĵoj, ĉar laŭ la 11a paragrafo de la Fundamenta Gramatiko ja vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la radikoj, ĉe kio la ĉefa vorto staras en la fino: Nur se oni konsideras la kategori-vortojn ĉefaj en ekzemploj kiel *subtaso*, *grandanima*, *perlabori* oni ricevas laŭfundamentajn kaj sence ĝustajn kunmetaĵojn, nome (*sub taso*)-*o*, (*granda animo*)-*a*, (*per laboro*)-*i*. [Rim. (2008-11-24): Mi ne plu opinias, ke oni povas uzi la kategoriajn finaĵojn memstare, kp. mian diplomlaboraĵon, ĉap. 4.1.1!]

Per iom antaŭsciencaj vortoj (nu, tiutempe ja ankoraŭ entute ne ekzistis evoluinta sinkrona lingvoscienco) Zamenhof klarigas, ke Esperanto strukture malsimilas al la (hind)eŭropaj lingvoj, sed surface tamen ne aspektas strange kaj ŝajne kondukas kiel „normala“ lingvo.⁷ Piron 1980:20 ĝuste konstatas, ke jes ja ekzistas fundamenta diferenco inter Esperanto kaj aliaj izolaj lingvoj, nome ke ĉi-lastaj emas ellasi (do subkomprenigi) gramatikajn morfemojn, se la kunteksto jam sufiĉe klaras. Esperanto ja konas la principon de sufiĉo kaj neceso ene de sia vortfarada sistemo, tamen ellaso de finaĵo aŭ kategori-vorto (krom *o*) entute ne estas ebla. Per la nepra indiko de la vortspeco kaj per la akordigo inter substantiva kaj adjektiva epiteto la izola profunda strukturo ricevas trajtojn de aglutinaj aŭ fandaj lingvoj, tio tamen ne ŝanĝas la ĝeneralan enordigon de la lingvo laŭ la interrilato de siaj morfemoj.

4. Esperanta sintakso tipologie

Pro la multaj rilatoj, kiuj estas esprimataj en la sintakso, ĝuste tiu kampo donas multajn eblojn por diversaj tipologiaj klasifikoj. Parenteze oni ne forgesu, ke klasifikado estas ja ordigo, kaj ĉi tiu dependas de la elektitaj kriterioj, kiuj povas estas diversaj. Do ne eblas paroli pri bonaj aŭ malbonaj klasifikoj, ĉar ili ja samgrade estas veraj, se ili korekte respegulas la kriteriojn.

4.1 La „klasika“ sintaksa tipologio (de Greenberg) komparas la bazan vortordon, t.e. la sinsekvon de la bazaj sintagmoj subjekto (S), predikato (P) kaj eventuale objekto (O) en ordinara, neniel markita deklara propozicio.⁸ Klasifo 'SPO-lingvo' do ne nepre signifas, ke ne eblas aliaj vortordoj en tiu lingvo, sed nur, ke tiaj estas iel markitaj (ekz. por fokusigi, demandi ktp. Kp. la latinan kaj multajn aliajn lingvojn, kie eblas principe ĉiuj kombinoj de S, P kaj O, depende de la substrekendaj elementoj). La konata rezulto de tiuj esploroj estas, ke el la ses logikaj ebloj nur tri estas kutimaj (SPO, SOP kaj, jam malofte, PSO), dum por POS (en la malagasa) kaj OPS (hiŝkarjana) oni trovis nur po unu ekzemplon, kaj por OSP entute neniun (kp. Wells 1989:39).

Kiel ĉiuj gramatikoj ĝis nun asertis, kaj Wim JANSEN (Universitato de Amsterdam) intertempe per scienca esploro pruvis,⁹ la baza vortordo de Esperanto estas, kiel en la plimulto de la lingvoj, SPO. Ĝi estas tamen libera en tiu senco, ke oni rajtas modifi ĉi tiun bazan ordon por

7 Tiu ŝajnsimileco estas la ununura ebla kaŭzo, ke granda lingvisto kiel Couturat povis komplete miskompreni kaj tordi la lingvon, skribante monografion pri la „derivado en Esperanto“, procezo apenaŭ ekzistanta en ĝi – eĉ vortoj kiel *hom/a*, *martel/i*, *far/o* estas jam kunmetitaj; kunmetado en Esperanto do estas plejpleje baza.

8 Problemo restas lingvoj, kiuj, precipe ĉe la verbo, havas nekontinuaajn elementojn, ekz. germ. *ich komme nicht umhin...* 'mi ne evitos...'. La ekzemplaj frazoj ne enhavu pronomojn, ĉar ili kondukas ofte speciale, ankaŭ en Esperanto ili estas multe pli facile moveblaj ol substantivoj, kiel konstatis Jansen (vd. sube).

9 Kp. lian prelegon de la 2a de decembro 2006 en Berlino „Wortstellungsmodelle im ursprünglichen und im heutigen Esperanto – Zeugen einer natürlichen Entwicklung der Syntax?“, aperonta en la serio *Interlinguistische Informationen. Beiheft 14* (Berlin) fine de 2007.

diversaj celoj (vidu sube), aŭ se la frazo enhavas objektan pronomon (en ĉi tiu kazo oftas SOP). Laŭ Jansen la vortordo en la hodiaŭa Esperanto estas komparebla precipe al la rusa.

4.2 Alia konata ordig-sistemo, la rilata tipologio, komparas la esprimon de la bazaj temroj 'aganto' kaj 'paciento' en frazo, per kio ĝi fakte kombinas sintaksajn kaj morfologiajn trajtojn. Tamen tiu klasifikado restas precipe ĝenerala, ĉar tre multaj lingvoj konas diversajn tiajn procezojn, ekz. la t.n. partan ergativecon (angle *split ergativity*), kp. ankaŭ germ. *mich* (akuzativo) *friert* 'frostas al mi' – frazkonstruo, kiu aperas tipe en aktivaj lingvoj (vd. sube).

Oni distingas unuflanke *aktivajn lingvojn*, kie aganto kaj paciento ĉiam havas la saman esprimilon (en kazohavaj lingvoj ergativon resp. akuzativon), sendepende de la (ne)transitiveco de la verbo¹⁰ kaj aliflanke lingvojn, kiuj faras distingon inter netransitivaj frazoj, kie aganto kaj paciento aperas en la sama (morfologie ofte senmarka) kazo (kiel subjekto), kaj transitivaj frazoj, kie unu el la temroj havas alian, specialan kazon (por distingi subjekton kaj objekton): Laŭ la du logikaj elektebloj oni do povas distingi *nominativajn lingvojn*, kie la aganto restas en la nemarkita kazo kaj la paciento alprenas la t.n. akuzativon,¹¹ disde la *ergativaj lingvoj*, kie la aganto alprenas la t.n. ergativon, dum la paciento restas en la nemarkita kazo (kiun oni ĉi tie nomas absolutivo).¹²

Esperanto estas klare nominativa lingvo, kp. la frazojn *mi(-Ø) kantas*, *mi(-Ø) falas*, *iu(-Ø) batas min*, krome ekzistas pasivo (*mi(-Ø) estas batata*), kiu ne ekzistas en aktivaj aŭ ergativaj lingvoj. Tamen la disvastiĝo de la sufiksoido *-iĝ-* por esprimo de ne-aktiva verbvoĉeco (*audiĝas muziko*) generis strukturojn similajn al ergativa frazkonstruo, kp. *la hundo batiĝas fare de la viro*¹³ – ankaŭ ĉi tie pacieron esprimas la simpla kazo, kiu aperas en netransitivaj propozicioj (nominativo=absolutivo), la verbo ne estas pasiva, kaj la aganto alprenis specialan kazon (analize esprimitan ergativon). Neniu diru, ke Esperanto estas tipologie sensurpriza!

4.3 Hodiaŭ oni ofte preferas ankoraŭ aliajn klasifikadojn:

a) Laŭ informo-strukturo: La esprimo kaj distingo de jam konataj, novaj aŭ precipe gravaj informoj (temo – remao – fokuso), estas esenca tasko de lingvo, tamen longe preteratentata de

10 Aŭ pli konvene: Transitiveco ne estas eksplike esprimata en aktivaj lingvoj, ĉar la temroj 'aganto' kaj 'paciento' havas senperan, fiksan esprimilon. Ekzemplo: En la dakota *wa-* esprimas 'mi' kiel aganton, ekz. en frazoj kiel *mi kantas*, *mi batas iun*, dum *ma-* esprimas 'mi(n)' kiel pacieron, ekz. *mi falas*, *iu batas min*.

11 Subjekto de transitiva verbo do estas same traktata kiel subjekto de netransitiva verbo. Al tiu tipo apartenas la plej multaj lingvoj, inter ili la hindeŭropaj kaj semitaj. Pli bona termino eble estus 'akuzativaj lingvoj'. Ekzemplo: Lat. *Marcus ambulat* 'Marko promenas', *Marcus equum videt* 'Marcus vidas ĉevalon'.

12 Ĉar la absolutivo en netransitivaj frazoj funkcie identas al la nominativo en nominativaj lingvoj, oni en la literaturo foje trovas ankaŭ ĉi tiun terminon por ĝi, sed pro la malsama konduto en transitivaj frazoj oni prefere distingu ambaŭ kazojn. Ekzemplo: Ĥuria *attai=v=ū=mma* (abs.) *Ani=ž* (erg.) *futt=ož=a* (erg. verbvoĉo) 'via patro An generis vin'.

13 Mi dankas la ekzemplon al d-ro Rudolf FISCHER, Münster (Germanujo).

la lingvistoj. La esprimiloj estas tre diversaj (kaj ofte apude aŭ eĉ kombine aperas en la unuopaj lingvoj): Kelkaj lingvoj uzas prozodiajn rimedojn (emfazo de la plej grava parto; ekz. en la angla), aliaj dupropoziciojn¹⁴ (la indonezia, la angla), multaj aŭstroneziaj lingvoj, la japana k.a. havas fokusigajn partiklojn, kaj fine lingvoj, kies sintakso allasas (relative) liberan vortordon, uzas ĉi tiun por esprimi tiujn konceptojn. Al ĉi-lastata grupo klare apartenas Esperanto, kp. *Mi vidas vin. Vin mi vidas. Vidas vin mi. Vidas mi vin.*

b) Laŭ la paro kapkomenca – kapfina oni povas kompari kaj tutajn frazojn kaj unuopajn sintagmojn. La esploristoj montris, ke laŭinkline (denove, puraj realigoj maloftegas) la lingvoj dividiĝas en du grupojn (kp. Wells 1989:49-53): En la kapkomencaj (aŭ dekstrobranĉaj) lingvoj (ĉ. 75%) la komplementoj (ekz. epiteto, rilata subpropozicio, posedanto) sekvas la kernovorton (antaŭas ĝin adpozicioj, foje ankaŭ epiteta adjektivo), dum la kapfinaj (aŭ livobranĉaj, ĉ. 25%) montras plejparte inversan ordon. Esperanto estas tipe kapkomenca lingvo, tamen ĝi preferas antaŭmetitan epitetan adjektivon, kp. *la nova aŭto de mia onklo, kiu vizitis min antaŭ du tagoj, paneis.*

4.4 Laŭ Piron 1980:25-27 la Esperanta sintakso estas esence slaveca, kaj certe kelkaj fenomenoj, kiel ekzemple, ke oni tradicie povas uzi *por*, *krom* kaj *antaŭ ol* kun infinitivo, sed ne aliajn prepoziciojn, devenas de slava (pli precize rusa-pola) influo al la stilo de Zamenhof kaj aliaj. Sed tamen kelkaj trajtoj, kiujn Piron nomas slavaj, ja povus sekvi el logikaj principoj, ekz. la uzado de refleksiva pronomo (pro klareco, same en la klasikaj lingvoj) aŭ de adverbo ĉe infinitiva subjekto (pro la baza regulo, ke verbon priskribas adverbo). Decido en tiaj okazoj ne estas ebla.

5. Esperanta leksiko tipologie

Leksikologia-semantika tipologio de Esperanto aŭ ajna alia lingvo estas tre malfacila demando, ĉar temas pri ankoraŭ subevoluinta branĉo de la lingvoscienco. Ĉe la leksiko el praktikaj kialoj (ne nur en planlingvo) pli gravas ĝia laŭetimologia konsisto, temo, kiun ĉi tiu eseo tamen ne pritraktas.

Laŭ Polański 1999:301 societoj primitivaj havas pli da konkretaĵoj ol abstraktaĵoj en sia nociaro.¹⁵ Esperanto certe ne diferencas en tiu rilato de la aliaj evoluintaj lingvoj.

Multe pli interesa eble estus komparo de la t.n. semantikaj molekuloj, t.e. nocioj, kiujn oni ofte uzas por difini aliajn, pli kompleksajn nociojn en la diversaj lingvoj. La ideo devenas el la semantika skolo de Anna WIERZBICKA (kp. la eseon „Esperantigo de la metalingvo de Anna Wierzbicka“ de Cyril BROSCHE, ĉapitreto 2.1). Esploroj rilate Esperanto tute mankas.

14 Termino formita laŭ la modelo de *dupunkto* (strukture (*du punktoj*)-o); angle *cleft sentence*.

15 Ŝajne ĝis nun ne ekzistas tre multaj rezultoj, la aliaj lingvistikaj leksikonoj almenaŭ eĉ ne mencias ĉi tiun subfakon de lingvotipologio.

6. Resume

Montriĝis, ke Esperanto tipologie plej ofte sekvas tiun modelon, kiun sekvas la plimulto de la lingvo de la mondo, ekz. en la malhavo de tonemoj, en saĝa kombino de izolaj, aglutinaj kaj fandaj trajtoj (eblas do rigardi Esperanto laŭ la propra lingva fono), en sia baza vortordo ktp. Kompreneble tia konsisto estas ideala por tutmonda lingvo, kaj oni vere devas admiri la senton de Zamenhof ĉe la ellaboro de la lingva sistemo, multajn jarojn antaŭ la komenco de la esploroj pri universalajtoj.

Literaturo

Hadumod BUSSMANN. 2002. *Lexikon der Sprachwissenschaft*. 3a eld. Stuttgart.¹⁶

Hanna DALEWSKA-GREŃ. 1997. *Języki słowiańskie*. Warszawa.

Constantin DOMINTE. 2001. „Fonemstatistikaj rimarkoj pri Esperanto“. En: Sabine FIEDLER, LIU Haitao (eld.). *Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag/ Studoj pri Interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice, 337-345.

Helmut GLÜCK (eld.). 2005. *Metzler Lexikon Sprache*. 3a eld. Stuttgart – Weimar.¹⁷

KALOCSAY Kálmán, Gaston WARINGHIEN. 1980. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 4a eld. Rotterdam.

Claude PIRON. 1980. *Esperanto: eine linguistische Standortbestimmung. Aus dem Esperanto übersetzt von Günther Becker*. Saarbrücken (germana traduko de: la sama. 1977. *Esperanto – ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Rotterdam).

Kazimierz POLAŃSKI (eld.). 1999. *Encyklopedia językoznawstwa ogólnego*. 2a eld. Wrocław – Warszawa – Kraków.¹⁸

John WELLS. 1989. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam.

Bertil WENNERGREN. 2005. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Versio 14.0. Reta eldono: www.bertilow.com/pmeg/.

L. L. ZAMENHOF. 1992. *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*. 18a eld. Rotterdam.

16 Uzitaj artikoloj: *Agglutinierende Sprache, Aktivsprache, Ergativsprache, Inkorporation, Isolierender Sprachbau, Polysynthese, Relationale Typologie, Sprachtypologie*.

17 Uzitaj artikoloj: *Agglutinierende Sprache, Aktivsprache, Akzentzählend, Isolierende Sprache, Polysynthetische Sprache, Relationale Typologie, Silbenzählend, Sprachtypologie*.

18 Uzitaj artikoloj: *Inkorporacja, Języki afiksalne, Języki aglutynacyjne, Języki alternacyjne, Języki fleksyjne, Języki izolujące, Języki samogłoskowe, Języki spółgłoskowe* *Klasyfikacja typologiczna języków*.